# LA PACDEFENDANTO

N-o.46. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Okt.1955

## ĈIRKAŬITA ESTAS LA LASTA BASTIONO

Kutima devizo en la Popoldemokratioj estas:"Kun la Sovjetunio al glora estonto!"-Jes,ankaŭ ni esperantistaj pacdefendantoj esperas tiel.Ĝis antaŭ nelonge kaŭzis al nia movado en ĉiuj Popoldemokratioj la plej grandan malhelpon manko de Esp-movado en Sovjet-Unio. Ĉie,kien ni venis kun nia propagando,la oficialaj instancoj rifuzis nin kun la rimarko,ke en Sovjet-Unio Esperanto ne ekzistas.

Tirante la konsekvencon el tiuj falsaj konkludoj,ni devis decidi antaŭ ĉio malaperigi tiun ĉi argumentadeblecon,kiu servis al la kontraŭuloj de Esperanto.

Por atingi tion,ne eblis interveni rekte en Sovjet-Unio kun, kiel oni diras,malplenaj manoj. Ankaŭ niaj sovjetaj gek-doj povis nenion entrepreni sen almenaŭ firma pozicio en amikaj landoj. El tiu ĉi konsekvenco fine rezultis la neceso unuavice organizi la Esp-movadon en la pli facile akireblaj bastionoj - la Popoldemokratioj,kaj poste el tiuj pozicioj ataki la por ni gravan centron - la Sovjet-Union.

Kvankam ankaŭ tre malfacila tasko,kiun la neŭtralaj esperantistoj ne kapablis solvi, ni sukcesis ĝin plenumi. Doninte Esperanton en la servon de la mondpaco,ni unue plenumis gravajn decidojn de la Monda Packonsilantaro,kiu proklamis doni ĉiujn fortojn al dispono por sekurigi kaj defendi la pacon kaj due,ni forprenis al la malamikoj de Esperanto la eblecon argumenti kontraŭ ni,ĉar en tiu kazo ataki Esperanton,signifus ataki unu el la fortojn,kiu defendas pacon,kaj tia ago ne harmonius kun la deziroj de la popoldemokrataj registaroj,nek kun la deziroj kaj ŝtrebado de ties popoloj mem.

La malamikoj estis senarmigitaj.Naskiĝis Esp-pacmovadoj en Ĉeĥoslovakio/unuavice/ kaj dank'al nia laboro vekiĝis samaj movadoj en Hungario,Polio, Bulgario,pli malfortaj en DDR-Germanio kaj Romanio,kaj laste eĉ en Indonezio kaj Vietnama Dem.Respubliko./Vidu interne apartan raporton!/. La reto post pena laboro kuntiriĝas.Ĉiuj ĝis nun konkiritaj bastionoj nun koncentrigas siajn fortojn kaj atenton al la ĉefa kaj plej malfacile akirebla celo - la Sovjet-Unio.

Aliaflanke ankaŭ niaj sovjetaj gek-doj ne dormas.Ankaŭ ili renkontiĝis kun similaj malfacilaĵoj.Iliaj oficialaj instancoj proklamis Esperanton kiel kosmopolitaĵon,malamikan al la laborista klaso kaj la neŭtralaj esperantistoj ankoraŭ verŝis akvon sur la muelilon per sia severa neŭtraleco,respektive sindeteno de la pacmovado kaj bojkoto de socialismo.

Nun la situacio ŝanĝiĝis.Niaj sovjetaj gek-doj jam povas argumenti per forta esp-ista pacmovado naskiĝinta en ĉiuj Popoldemokratioj kaj disvastiĝinta pere de "MEM"en multaj aliaj landoj. Esperanto fariĝis grava faktoro en la Monda Pacmovado, kaj tion eĉ niaj kontraŭuloj en Sovjet-Unio jam ne povas nei aŭ nevidi.El tiuj pozicioj jam radikas nun ankaŭ la atakoj de niaj sovjetaj kunbatalantoj kontraŭ tiuj,kiuj ĝis nun havis eblecon rifuzi la agnoskon de la

internacia lingvo.
La lasta bastiono de estas firme ĉirkaŭita kaj ne nur tio, sed en ĝi mem batalas niaj fidelaj kunbatalantoj, veraj "samideanoj".
Kiel nun daŭrigi tiun ĉi batalon ĝis la sukcesa venko? Certe ĉiuj antaŭkondiĉoj estas jam kreitaj. Necesas nur la poziciojn daŭre plifortigi, elkonstrui kaj provizi per novaj fortoj por la lasta kaj decida ofensivo.
Unu el la antaŭludoj al tiu ĉi ofensivo estis la amasa alfluigo de korespondaĵo, raportoj kaj argumentoj, materialo el ĉiuj landoj al niaj sovjetaj amikoj. Dank al niaj celkonsciaj gek-doj, kiuj tiujn materialojn al la sovjetaj amikoj sendis, tiuj akiris gravajn argumentojn kaj ne plu staras kun malplenaj manoj antaŭ la oficialaj instancoj de kiuj dependas la aprobo de Sovjetunia Esperantista pacmovado. Komprenebla, per tio nia tasko ankoraŭ ne finas. Necesas daŭre informi la sovjetajn gek-dojn pri ĉiuj sukcesoj, atingitaj en aliaj landoj per Esperanto por la paco kaj krom tio ni devas serĉi pluajn novajn korespondantojn en ĉiuj landoj de la vasta Sovjet-Unio kaj transdoni ilin al niaj gvidantaj k-doj en Moskvo por kunlaboro.
Ankaŭ multo dependas de la sovjetaj gek-doj mem. Al ili certe estas konataj multaj aliaj, eble eĉ alilokaj sov. esp-istoj, kun kiuj la centro ĝis nun ne kontaktas. Por povi elkonstrui firman tutlandan movadon en Sovjetio, estas necese kolekti ĉiujn malnovajn k. eventuale eĉ novajn esperantistojn. Ĉiuj niaj gek-doj klopodu serĉi tiujn kaj senprokraste sendu iliajn adresojn al k-do. Bokarev aŭ Pisarev en Moskvo, por ke ili registru ilin kaj ligu kontakton kun la celo fondi grupojn kaj tutlandan Esp-pacmovadon.
En tiu senco kaj por tiu celo ankaŭ nia redakcio volas kontribui per regula alsendo de nia organo senpage al ĉiuj sovjetaj esperantistoj, de kiuj ni nur petas favorajn raportojn por niaj legantoj. Certe ankaŭ "MEM" disponigos sian organon "PACO" en la esp-pero, ke la sovjetaj gek-doj sukcesos baldaŭ rekompenci ĝin per propra eldono de "PACO" kaj tielmaniere envicigos en nian eldonsistimon kaj kontribuos atingi gloran estonton por nia Esp-movado kaj pacon inter la popoloj, en la senco de nia majstro d-ro. L. L. Zamenhof.

R. BURDA

## VIRINOJ EL ĈIUJ LANDOJ RAPORTU!

K-dino. Tada HIROKO el Osaka estis komisiita de tiea Virina Asocio enketi per Esperanto raportojn pri la situacio de virinoj en ĉiuj landoj. K-do. M. LUNGA, Skoronice 110, KYJOV en ĈSR, kiun ŝi petis la 7. de sept. plenumi ĉi de ziron, opinias, ke nia organo povas plej objektivi servi al tiu afero. Sekve ni ĉi sube publikas la demandaron kun la alvoko, ke ne nur ĉehosl. virinoj, sed ankaŭ alilandaj, tute objektive respondu la jenajn demandojn:

1. Kiom % da fraŭlinoj okupiĝas post fino de lernejjaroj en laboro aŭ profesio ĝis la edziniĝo?
2. Al kiaj laboroj aŭ profesioj okupiĝas plej multaj fraŭlinoj? Skribu la specon de ilia okupo.
3. En kia aĝo edziniĝas plejmultaj fraŭlinoj, kaj kia diferenco estas inter la aĝoj de geedzoj?
4. Kion deziras plej varme junaj fraŭlinoj de sia amiko? Kion ŝi deziras de li kiel kondiĉon de edziĝo, ĉu monon? ĉu virecon? ĉu eminentecon aŭ ion alian?
5. Ĉu ekzistas malhelpoj por geedziĝo? Ekz.: manko da loĝejoj, malfacila vivo pro malalta salajro ktp.
6. Ĉu virinoj kun viroj estas egalrajtaj, ekz. je salajro kaj en aliaj okazoj?
7. Ĉu virinoj ankoraŭ daŭrigas sian laboron aŭ profesion post la edziniĝo?/Kiom % da edzinoj laboras?/
8. Kian opinion havas junaj virinoj pri komuna laboro kun la edzoj? Ĉu ili pozitive plezure laboras, aŭ ili estas devigataj kaŭze de malalta salajro de edzo kunlabori?
9. Kion oni faras, kiam laboranta edzino naskas infanon?
10. Kio plejmulte ŝanĝis post la mondmilito en kulturo, vivado, moralo ktp./raportu detale!/
11. Kion opinias junaj virinoj pri Atom-kaj Hidrogenbomboj? ./.

Ni preferas foton de la aŭtorinoj,kiun ni laŭeble publikos kun la raporto en ĵurnaloj, kaj la plej objektivajn raportojn la redakcioj rekompencos per donaco Ĉion sendu al :

K-dino.Tada HIROKO,KANSAI LIGO DE ESPERANTO GRUPOJ,Nakacu-hama-doori,2-20,Oojodo-ku,OSAKA,Jap.

Kiel ekzemplon ni prezentas raporton pri la virina situacio en Japanio:

LA VIRINA SITUACIO EN JAPANIO

/Verkis k-dino.Tada Hiroko/

1. Eble pli ol 90% da fraŭlinoj okupiĝas al laboro aŭ profesio. El miaj konatuloj preskaŭ ĉiuj fraŭlinoj laboras.
2. Finante sian lernodevon, ili laboras en fabrikoj de fibraĵo /fadenoj kaj teksaĵoj/,medikamentoj,nutraĵoj ktp.Ellernante altgradan lernejon,ili laboras kiel oficistinoj,kontoristinoj aŭ maŝinskribistinoj ĉe firmaoj. Ellernante pli altgradan lernejon,ili fariĝas instruistinoj, kuracistinoj ktp.
3. Plej multaj edziniĝas en aĝo ĉ.22-27 jaroj.La diferenco inter geedzoj estas 5-10 jaroj.
4. Fraŭlinoj deziras de ili plej multe"varman,veran amon" kaj "dirigentecon",sed verdire,iom riĉa,belfigura kaj vireca edzo estas plej amata de fraŭlinoj.
5. Nun en Japanio mankas loĝejoj kaj kaŭze de tio edziĝoj estas prokrastataj.
6. Virinoj ne estas egalrajtaj. Ĉiuokaze la virinaj situacioj estas pli malbonaj ol la viraj, kvankam jap.leĝo proklamas la egalrajtecon.
7. Plej multaj virinoj daŭrigas sian laboron ankoraŭ post la edziniĝo,ĝis kiam ili fariĝas patrinoj/eble 95 % /.
8. Japanaj junaj geedzoj multaj komune laboras.Ili aspektas feliĉaj.Sed kaŭzo de ilia kunlaboro estas nesufiĉa edza salajro. Sed nun en Japanio kunlabori estas tute ordinara afero
9. Junaj patrinoj plej multe eksiĝas de sia laborejo,ĉar nur malofte troviĝas tie konvenaj instalaĵoj por infanoj. Patrinoj ricevas nenian subtenon de la ŝtato. Nur iam ili ricevas malaltan sumon de la entrepreno kiel t.n. gratulmonon. Aninoj de laborista asekuro ricevasn monsubtenon kaj rajtas ripozi kelkajn semajnojn hejme.Sed tio ne plaĉas al la entreprenistoj kaj post la hejmrestado tiuj maldungas ilin.Post lanaskiĝo de infanoj la geedza vivo fariĝas malfacila,kvankam la salajro de patroj iom plialtiĝas.La laboristoj ĉiam batalas por plialtigo de la salajroj,por esti kapablaj vivteni familion. Kuracistinoj kaj aliaj,kelkaj daŭrigas en sia profesio.
10. La antaŭe tre hezitemaj virinoj post la milito tre kuraĝiĝis kaj ofte parolas antaŭ publiko. Laboristoj antaŭe mizere vivis,sed post la milito ilia vivnivelo plialtiĝis.Generale la japana vivo fariĝis pli malfacila ol antaŭe,ĉar la prezoj de ĉiutagaj vivbezonaĵoj altiĝis je 300 ĝis 400oblo,dume la salajroj fariĝis apenaŭ 200oblaj.
11. Ni Japanoj elkore deziras kaj klopodas por ke oni ĉesu la fabrikadon kaj eksperimentadon de A-kaj H-bomboj,ĉar ni jam trifoje spertis ties teruran efikon sur propraj korpoj. Neplu Hiroŝima ! Neplu Atom-kaj Hidrogenbombojn !

Tio estas la pensoj,kiuj plej forte okupas la japanajn virinojn.

K-do.LENIN PRI ESPERANTO

En n-o.21-22 de "PACO" aperis letero de prof.Mieczislaw Sigmarski,en kiu estas cititaj esprimoj de Lenin pri Esperanto. Ĉar mi ne scias la adreson de la profesoro,mi petas vin iel esplori, en kiuj dokumentoj estis fiksitaj tiuj vortoj de Lenin.Se oni povus pruvi tiun fakton,tio alportus grandan helpon al la Esp-movado en Sovjet-Unio.

En S.U.la Esp-movado iom post iom disvastiĝas.Sed grava malhelpo estas manko de esperantaĵoj. Alilandaj konsciaj esp-istoj sendas al siaj korespondantoj en Sovjetio Esp-revuojn,prospektojn librojn ktp. Per tio ili vigligas la agadon de niaj esp-istoj. Sendube ĉio estas rekompencota, kiam eklaboros nia propra eldonejo. Ni esperas,ke tiu ĉi helpo

daŭros ankoraŭ iaman tempon.
S.V.Saričev
Ul.Osipenko 56,kv.2,MOSKVO-127.

Rim.de la red.: Ĉar ni mem ne konas la dezirataĵn dokumentoĵn en kiuj Lenin parolas pri Esperanto,ni petas la internaciajn legantojn,okaze,ke ili estas al iu konataj,senprokraste informi k-don.Saričev pri tio. Ĉi alvokon bonvolu represi ankaŭ aliaj redakcioj.

ESPERANTO EN LA UNIVERSITATO DE SOFIA

La 7an de oktobro 1955 estis solene malfermita nova lernojaro de Esperanto en la Ŝtata Universitato de"Kliment Ohridski" en Sofio. Krom 65 gestudentoj, kiuj komencaŝ lerni Esperanton, ĉeestis ankaŭ la Centra komitato de Bulgara Esperanto Asocio, la estraro de Esp-societo "Maksim Gorki",membroj de la Esperanto-katedro kaj reprezentantoj de Esp-societoj el urboj Pazargik,Dimitrovo,Ruse kaj Borima. La ĉeestantoĵn alparolis k-doj. Vasil ĈOĈOV,docento de dialektika materialismo kaj Canko MURGIN,asistanto de ekonomia geografio. Ili klarigis la signifon de Esperanto en senpera interrilato de ordinaraj homoj el la tuta mondo.Apartan atentigon ili dediĉis al Esperanto en la servo por la paco,scienca interhelpo kaj kultura progresigo.

Poste k-do.prof.d-ro.Stojan ĜUĜEV diris kelkajn enkondukajn vortojn kaj rekte transiris al la unua leciono.Sekvis la necesaj klarigoj de la alfabeto kaj la komencantaj studentoj atente kaj zorgeme auskultis sian amatan profesoron.

Por plibonigi la instruadon, deko da profesoroj,docentoj kaj asistantoj fondis en Sofio Esp-katedron,kiu funkcias sub la aŭspicio de la Bulgara Esperantista Asocio.Gia estro fariĝis k-do.prof.d-ro.Stojan GUĜEV.
Canko MURGIN.

Niaj legantoj certe kun granda ĝojo akceptas ĉi raporton kaj la redakcio en ilia nomo gratulas sincere al la bulg.gek-doj,deziranta al ili multan sukceson!

ESP-PACDEFENDANTOJ EN VIETNAM

Sen longa antaŭparolo ni citas leteron,kiun sendis al la prezidanto de "MEM" k-do.N.V.KINH el Hanoi :

.......Ni varme dankas al la ĉeĥoslov.gek-doj pro ilia sukcesa laboro en la Tutŝtata Konferenco de Esp-Pacdefendantoj kaj plene aprobas gian REZOLUCION,promesante al ĉiuj "MEM"-anoj uzi Esperanton serve al mondpaco kaj amikiĝo.Komence ni skribas,sendante kune tiun rezolucion al la ĉeĥoslovaka ambasadorejo en Vietnam kaj petas transdoni al la ĉeĥoslov.registaro jenajn proponojn :
1. Subteni la Esp-movadon kiel porpacan movadon.
2. Eldoni Esp-lingve por eksterlandajn propagandaĵojn.
3. Dissendi denove Esperanto-programon en Radio-Praha.

Ni klopodas fondi vietnaman "MEM"-sekcion en proksima tempo. Tiucele ni petas vian helpon per alsendo de diversspecaj esperantaĵoj,ĉefe porpacajn.Ni volonte interŝanĝus kun vi Esp-ĉeĥoslov. vortaron,lernolibron,propagandafiŝojn,Esp-librojn,gazetojn k.t.p.kontraŭ francaj libroj,vietnamaj il.jurnaloj,p.m.ktp....aŭ kion vi mem deziras ricevi.

Ni juŝ eliris el sanga,ruiniga batalo.Ĉio devas esti rekonstruita,ankaŭ la Esperanto-movado. Nun mankas al ni ĉio,precipe Esp-lernolibro,kiun ni klopodos eldoni baldaŭ. En 1936 ekzistis en nia lando ĉ.300 esp-istoj,sed ni ankoraŭ ne havas informon pri ilia nuna sorto.

Bonvolu sciigi al ni adresojn de "MEM"-sekcioj kaj aktivaj esp-pacdefendantoj el Popoldemokratioj kaj aliaj landoj,precipe el Hindio,Indonezio,Burmio. Sendu ankaŭ al ni popoldem.Esp-gazetojn

Mi sendas al vi la plejkorajn salutojn de vietnamaj esperantistaj pacdefendantoj.
N.V.KINH
Adr.: N-o.2,Ly-thuĕng-Kiĕt,HANOI Viet-nam.

La red.: Gek-doj nehezitu kaj sen prokraste donu vian helpon,ĉar ankaŭ Vietnam grave kontribuos al nia afero! "LA RETO KUNTIRIĜAS"

## ABELISTOJ ATENTU !

De la 12-18/8.1956 okazos en Wien /Aŭstrio/la 16a Internacia Kongreso de Abelbredistoj,dum kiu oni oficiale parolados angle,france, germane kaj uzos la modernan interpretaparaton,pri kiu la arangantoj,pri ĝi sensperta,j,nun ankoraŭ fieras,kvankam oni ankaŭ proklamas,ke la personaj rilatoj de la kongresanoj estos tre akcelata. Ke tia aparato guste por tio ne taŭgas,tion ni esp-istoj scias sed evidente ne la kongresarangantoj,sciante ĝis nun nenion pri la supereco de nia lingvo por senpera rilato inter kongresanoj.
La esp-abelistoj intencas helpi tiun deziron kaj obei la admonon de d-ro.Privat,ripetitan dum la 40 U.K.en Bologna,demonstri antaŭ internacia publiko neesperantista la unikan destinon kaj funkcion de Esperanto.Se sufiĉe da esp-abelistoj kunagos,ni sukcesos! La abelistaj samideanoj en Aŭstrio projektas programon ĉirkaŭ la mondfama abelspeco "Carnica"/P.Kárníka/,unu el la plej eminentaj abelbredistoj de Eŭropo. Por prepari la arangon ili devos baldaŭ scii,kiom da esp-abelistoj intencas partopreni la kongreson.
Tial necesas,sendi sian adreson kun la deziresprimoj pri la programo kaj skizita utiligo de Esperanto dum tiu kongreso kaj en la faka gazetaro,al UEA,Heronsgate,RICKMANSWORTH/Herts/Anglio.
Samideanoj,speciale ekster la teritorioj de la angla,franca kaj germana lingvoj,atentigu viajn konatajn abelistojn kaj instigu ilin al partopreno kaj esprimi la deziron,ke la Kongreso uzu por ĉiuj oficialaĵoj Esperanton. Diru al ili,ke dum tiu tempo ĝis la kongreso ili sukcesos ellerni Esperanton,se ili volos kaj estos sufiĉe diligentaj.

D-ro.A.HALBEDL
Knittelfeld

Esp-gazetoj,bonvolu represi !

## EL GERMANIO-D.D.R.

Prelegon laŭ la japana E-broŝuro "NI NE POVAS SILENTI"faris en uzina radio en urbo Olsnitz nia kdo E.Rosner antaŭ 6.000 gelaboristoj. La prelegon parte menciis ankaŭ la distrikta taggazeto"FREIEPRESSE" La 1.de sept.tiu uzina packomitato arangis okaze de "Mondpactago" ekspozicion,en kiu abundis Esp-pacmaterialo disponigita de k-do.E.Rosner.

## SENDU SALUTON !

La Slovaklingva Instruista Seminario en Budapest ricevis la nomon de eminenta ĉeha instruisto-verkisto"Jan KOMENSKÝ".Estus dezirinda,ke ĉeĥosl.pacamikoj tiuokaze salutu la Seminarion, kaj samtempe atentigu ĝin, ke Komenský estis proponinta jam antaŭ pli ol 300 jaroj enkondukon de ia internacia lingvo por kulturaj rilatoj inter la nacioj. La adreso estas:
Slovaklingva Instruista Seminario,Villányi ut.5-7,BUDAPEST XI.

P.Balkányi

## PRI ROZ-ĜARDENO-LIDICE

Al la ĉeĥoslov.vilaĝo LIDICE,detruita de germanaj faŝistoj kaj nun rekonstruata,multaj hungaraj uzinoj kaj komunumoj sendis florojn kaj roztrunkojn por planti memorigan ĝardenon. Laste en la nomo de hung.pacdefendantoj kaj je peto de pluraj packomitatoj,sendis la landa packonsilantaro 725 elektitajn roztrunkojn al Lidice.Samtempe el iniciativo de hungaraj packomitatoj,por memorigi ankaŭ en Hungario la teruran sorton de tiu vilaĝo,oni en plejfrekventa budapesta parko la "Urba Arbareto"kreos "Rozĝardenon Lidice".
Okaze de tio,estus bone sendi salutleterojn al la Hungara Pac-komitato en Budapest.

P. Balkányi

## JAPANAJ GEK-DOJ KUNLABORAS

Dum la Jap.Esp-Kongreso okazis fakkunveno de "MEM",kiun ĉeestis 12 k-doj.Ni decidis fondi en Japanio "MEM-sekcion kaj iu k-do.el Kansaia Ligo de Esperanto Grupoj/KLEG/ prenu sur sin la funkcion de sekretario.Estis elektita k-do.Nanba Syozi,kiu respondecos pri tio/lia adreso estu ĉe "KLEG"/kaj ni varbu por la komenco almenaŭ 50 anojn kun membrokotizo de 250 jenoj.Ni poyos eldoni MEM-gazeton almenaŭ unufoje en la jaro.Ĝi estos bele redaktata kun freŝaj raportoj kaj gusta slogano. Masao MIJAMOTO

"ANKAŬ PACDEFENDANTO"

Okaze de mia varbado por "MEM" mi ankaŭ koresponde rilatis kun esp-ista amiko Leif HEILBERG el Kitwe/Norda Rodezio/,kiu respondis al mi per jena letero:

Kitwe 6/10.55.

Estimata Sinjoro,

Jus alvenis via 43/44a n-o.de Paçdefendanto,kaj mi jam tralegis ĝin. Tie-ĉi mi havas kelkajn vortojn por via "pacvolo":

Laŭ mia opinio la paco estas tre bela,sed kiel eĉ la granda Gandhi unue diris:"Prefere estas batali ol vivi en sklaveco",tiel ankaŭ mi pensas,kaj ĝis la angla, franca,portugala kaj aliaj nacioj perdos siajn koloniojn,la imperiismo estos kaŭzanta multajn batalojn. Nun,mi estas tutcerta, ke ĉiu homo vivanta en la tiel nomataj"pacemaj"Popoldemokratioj tamen volus batali,se ili vivus en kolonio,kiu provas liberigi sin.Nome estas tiel,ke nur kiam du homoj havas la samajn rajtojn, fortojn kaj sendependecon de unu la alia,ili povas respekti kaj amikiĝi unu kun la alia.

La granda profeto Jesuo ankaŭ diris,ke vi devas dividi ĉion kun viaj gekamaradoj/kunhomoj/, kaj tio estas "komun"ismo en la propra senco de la vorto,sed li diris,ke tiu ago estu memvola - tiel farita guste pro la korramo al la homaro - ne sub devigo.

Por la okuloj de la okcidentano estas evidente,ke la profito de ies laboro estas devige dividata al aliuloj en la Popoldemokratioj.Tion mi ne ŝatas.

Mi fariĝas feliĉa,se alia homo feliĉiĝas per mia bon-ago - sed mi nur koleriĝas,se mi devus bon-agi pro ordono kaj pro maŝinpistolo en mia dorso.

Persona memvolo kaj libervolo estas la necesa bazo por reciproka amo kaj paco.

Se vi kuraĝas,vi rajtas publiki tion. Sincere salutas vin

Ankaŭ pacdefendanto

/Pro la "ankaŭ pacdefendanto" mi povas informi vin,ke mi en mia lando,Danlando,estas pacifisto kaj rifuzis partopreni militservon pro tio,ke mi ne volas mortigi aliajn,kiuj ankaŭ nur estas devigitaj de militinstigantoj iri al la batalkampo./

PUBLIKA RESPONDO

Kara Ankaŭ-pacdefendanto!

Kvankam vi ŝajnas rezisti la Mondpacan Esperantistan movadon, viaj opinioj tamen harmonias kun la programo de "MEM",ĉar ankaŭ ni ĉiuj,malgraŭ tio,ke ni estas batalantaj por la paco,plene aprobas la vortojn de Gandhi"Prefere batali,ankataŭ vivi en sklaveco" Vi ja devus scii,ke eĉ la Monda Packonsilantaro,kiu kolektas ĉirkaŭ si milionojn da pacdefendantoj,sincere apogas la liberigan batalon de la koloniigitaj resp. sklavigitaj popoloj.

Rilate la citaĵojn de Jesuo,vi prave difinis,ke temas pri "komunismo en vera senco de la vorto, nur resume de la imperialista mis-propagando vi estas erare informita pri la vivo en la Popoldemokratioj.Oni tie ja ne dividas la profiton de ies laboro al aliuloj kiel vi erare opinias,sed male, en la Popoldemokratioj oni malpermesas,ke unuopuloj enpoŝigu la profiton,kiu rezultas el la laboro de la tuto-de aliaj.Sed nek al tiuj uzurpuloj minacas la maŝinpistolo en la dorso,oni nur devigas ilin vivi el profito de sia propra laboro,kaj ne de aliuloj. Jesuo ja ankaŭ elpelis la komercistaĉojn el la templo,ĉar ili tiom impertinentiĝis,ke ili eĉ kuraĝis priŝteladi siajn kunhomojn en la sanktejo. Pro tio ankaŭ la faraonoj persekutis Jesuon,same kiel la novtempaj faraonoj kalumnias, mokas kaj persekutas nuntempe pacideojn en viaj landoj kaj instigas la popolojn al batalo j inter si, por ke iliaj profitoj ne malaltiĝu kaj ilia paradizo eterne daŭriĝu. Paco signifas,malaperon de tiuj faraonoj/imperialistoj/ĉar sen militoj ili ne kapablas vivi. Pro tio necesas,ke ĉiuj,eĉ divers-maniere pensantaj pacamantoj unuiĝu por defendi la pacon kaj gravan rolon povas en tiu batalo ludi Esperanto.

Mi esperas,ke ankaŭ alilandaj, niaj legantoj donos al vi respondon pere de nia redakcio,ĉar por nedomaĝi al vi,mi ne volas ĉi tie prezenti vian adreson. R.BURDA

MERKREDE LA 23.DE NOVEMBRO

prelegos en la Esperanto-Klubo de Praha k-do.Rudolf BURDA pri la dauraj progresoj de la Esp-pacmovado kaj la internacia situacio.
Estus dezirinda amasa partopreno kaj invitataj estas ankaŭ tiuj, kiuj la klubon gis nun ne vizitadis.La prelegon sekvos amika diskuto,proponoj kaj konsiloj.

EL JUGOSLAVIO

Krom en la urbo Zagreb,fondiĝis Esp-lektorejoj en Beograd,Sarajevo kaj Skoplji.Lastjare la klubo en Beograd ricevis 200.000 dinarojn subvencion de la urbestraro.En tiu ĉi jaro la klubo ricevis 500.000.
La ministerio por kulturo decidis donaci al la Serba Esperanto-Ligo 500.000 dinarojn por propag. celoj.

HISTORIO DE ĈEĤOSLOVAKA

ESPERANTO-MOVADO

Tiu ĉi ampleksa kaj certe interesa verko estas jus finverkita de k-do d-ro.Stanislav KAMARYT el Chotěboř
La demando nun estas,kiam ebligos ĝin publiki kaj distribui.

TUTŜTATA KONFERENCO

de bulgaraj esperantistaj pacdefen-dantoj okazis en urbo Plovdiv. Ĉe-estis pli ol 200 gek-doj el multaj lokoj.La ĉeestantoj montris neatenditan entusiasmon por la revig-ligo de la movado en Bulgario kaj starigis sian laborplanon.La Bulg. Esp-Asocio decidis labori kiel sek-cio de "MEM"kaj nun ĝi jam havas permeson,eldoni du foje en la jaro gian ofic.organon "PACO".Krom tio ĝi eldonis jam la 4an n-on.de sia landa organo"BULTENO"kun vere inte-resaj raportoj kaj modele redaktitan. Ĉi lasta estas abonebla ankaŭ ĉe nia redakcio kontraŭ pago de 13.-Kčs por la jaro 1955-56.

SCIENCA NOTO

Interesan eksperimenton oni faras nuntempe en Anglio por anstataui betonajn tavolojn sub ŝoseoj kaj domoj konstruotaj. Tiucele oni uzas miksaĵon de fruktosuko,algoj kaj semoj de helianto/sunfloro/. Tiu miksaĵo plue miksita kun tre malgranda kvanto da cemento mortigas la organikajn materiojn en la tero kaj kaŭzas hardiĝon de ordinara tero kvazaŭ densa betono.

C.Fielding
"MEM"-tradukservo,61 Springfield Rd., BRISTOL-6, Anglio.

INFAN-DESEGNOJ EL GAS-KAMEROJ

Redaktoro de anglalingva ĵurnalo "Demokratia Germanio Raporto"libertempis en Ĉeĥoslovakio kaj poste li publikis kelkajn raportojn,el kiuj ni prezentas jenan ekstrakton :
".... Post vizito de Lidice ni iris al la Juda Muzeo en Praha kaj rigardis ekspozicion de infandesegnoj. Estis desegnoj,kiajn oni atendas de infanoj inter 5-12 jaroj.
Sed... tiuj desegnoj estis efektive tre rimarkindaj,ĉar ilin verkis malliberigitaj infanoj en Terezín/Theresienstadt/.
Dum kelktempo la vivkondiĉoj tie,kie la Hitler-anoj montris "modelan judan kvartalon" ne estis tiel kruelegaj kiel en aliaj koncentrejoj kaj iuspeca lerneja edukado estis havebla al la infanoj tie. Nombro da desegnoj kaj skriboj,kiujn faris tiuj infanoj,postvivis la militon. Sed ne la infanoj,kiuj ilin verkis - ĉiuj elspiris sian lastan momenton en la gaskameroj de Auschwitz.
Kaj jen tiuj desegnoj prezentigas antaŭ niaj okuloj kiel korŝira rememorigilo. Tre malmulte da desegnoj bildigas terurajojn. Estis lumo kaj koloroj,kiuj inspiris la infanojn. La verkoj ankaŭ penas rememorigi la ordinaran vivstaton, kiu ekzistis antaŭ la kaptiteco.En preskaŭ ĉiu desegno,kiu bildigas stratan scenon,aperas florvendistoj kun grandaj faskoj da brilkoloraj floroj, kaj butikoj kies fenestroj krevas pro PANO.
Apud la desegnoj troviĝis ankaŭ versetoj kaj skriboj. Jen mallonga ekstrakto el eseo de Petro Fischl,naskita 1929 kaj mortinta en gasĉambro Auschwitz en 1944:
"Ni jam kutimiĝis al dormi sen litoj, genufleksi al ĉiu,kiu portas uniformon,promenadi laŭlonge de defluiloj surstrataj,

lasante la pavimojn liberaj por la "superuloj". Al vundoj kaj nudeco ni jam kutimiĝis, al vido de mortintoj kuŝantaj en siaj fekajoj. Vekiĝante por trovi, ke la homo, kiu kuŝas apud vi, la korpon premante kontraŭ la vian, mortis dum la nokto, ne plu sentmovas nin. Ni kutimiĝis al vido de mal-sanuloj kuŝantaj en malpurajo kaj koto - al kuracistoj, kiuj staras nenion povantaj. Ĉiu tage miloj da senhelpuloj alvenas ĉi tien kaj miloj samtempe estas forportataj....."

Kaj de Paul Friedmann, aĝo nekonata, gase mortigita en 1944........

"Mi ne vidas papiliojn en tiu ĉi loko. Papilioj ne loĝadas en juda kvartalo...."

Jen kelkaj vortoj de 12jara judino Eva Pick: ...."hodiaŭ, dum mi-a koro ankoraŭ viv-batas mi vidas miajn kunludantojn forportataj al morto. Pikas min la penso, ke estas pli bone morti ol post-resti kaj re-foje vidi...."

Kaj paragrafo el fabelo de Karlo Fleischmann....."Foje vivis reĝo kiu estis potenculo kaj tre eĝe korpforta. Kiam la malsato pikas al li la stomakon, li irus al la serv-tablo kaj dirus "Pleniĝu mi-an pelvon dufoje!"......

C.Fielding, 61 Springfield R-d. BRISTOL-6, Anglio./MEM-trad.servo/

EZOPA SAĜO
Sepdeksep fabloj
verse reverkitaj
de
K.KALOCSAY
. . .

Komuna Konversacia
Klubo-Kopenhago

UNIKA EVENTO EN LA ESPERANTO-MONDO!
La fama hung. poeto, d-ro K. Kalocsay, silenta de 8 jaroj, revenas al la esperanta parnaso per verko apude skizita.

En ĉarma, tute freŝa kaj facil-legebla maniero d-ro Kalocsay prezentas 77 klasikajn fablojn de la saĝulo Ezopo en perfekta Esperanto. Ilustrajoj de B.Hanberg 112-120 paĝoj.

La eldonejo bezonas antaŭmendojn! Petu prospekton pri mendkondiĉoj ĉe: KOMUNA KONVERSACIA KLUBO, Randbølvej 4, KOPENHAGO-F. Danmark. Nepagkapablaj landoj mendu pere de siaj koresp-anikoj kontraŭ alia konvena rekompenco.

MORTA KNABINETO

Nun mi per malgranda mano
frapetas ĉe homaj pordoj.
Ne eblo ja vidi mortojn,
tial vi trovas nur vanon.

Kio post dek jaroj restas
en memoro de la homoj ?
Kie Hiroŝimaj domoj ?
Herbaro en ruboj kreskas.

Unue mia buklo ekbrulis
okuloj iĝis rekrementoj.
Baldaŭ forportis ventoj
cindron. Ĝi surstrate rulis.

Ne petas mi trinkon, manĝon,
kiel vi eblo konjektis.
Miajn membrojn flamo plektis.
Ne proponu do frandaĵon !

Frapas mi ĉe viaj pordoj,
geonkloj karaj, subskribu!
por ke infanoj plu vivu
ne minacataj de murdoj.

De Nazim Hikmet. El ĉeĥa traduko de Jan Pilař en gaz."LITERÁRNÍ NOVINY" esperantigis
red. Jožka Staněk
PRAHA

Aleksej SURKOV:
EN LA PLACO DE ĈIELA TRANKVILEC'

En centra placo de ĉiela Trankvilec'
sub vento tra la stratoj kaj bulvardoj,
sonoras luma elorkestra belsonec'
kaj silk'riveras de la ruĝstandardoj.

En centra placo de Ĉiela Trankvilec'
kun klara en okuloj lukt-rebrilo,
defilas defendantoj de la feliĉec'
de paco, de laboro kaj trankvilo.

En centra placo de Ĉiela Trankvilec'
sin plektas en muziko nova kanto:,
alvenas ordinaraj homoj kun gajec-
la konstruantoj de Ĉinio granda.

En centra placo de Ĉiela Trankvilec
ho, kia ĝoj' en morgaŭ-konstruuloj!
Per bild' de drakoj kaj leonoj laŭ
la patrojn salutas gejunuloj.
la dec oj.

Kaj super placo de Ĉiela Trankvilec
oktobre brilas firmament' oblikva.
Sur ĉi-planedo englorigis la junec'
feliĉon teran de popol' antikva.

El rusa trad. Canko MURĜIN

Rim.: Placo de Ĉiela Trankvilec' estas loko por popolaj solenajoj en Peking-Ĉinio. Verkita de A.Surkov okaze de 6a datreveno de ĉina resp. kiam li estis kiel gasto en Ĉinio.
.............

## NIA MOVADO EN ČEĤOSLOVAKIO

**BRATISLAVA**, ĉi tie funkcias nun 2 rondetoj, unu ĉe la Sindikato, dua ĉe la Domo de Kulturo. En la dua 12 anoj kunvenas ĉiu dimanĉe de la 10-12a horo. Dank'al ĝia honora prezid. prof. Heimlich, ni akiris eblecon publiki artikolojn en kom. gaz. "PRAVDA" kaj aliaj. En la redakcio de Pravda ni ankaŭ havas ekspoz. fenestron, en kiu ni prezentas prop. materialon kaj in-formojn pri nia movado.

**BRNO**, la Esp-rondeto de la Kultur-domo en Brno kunvenadas regule ĉiu marde de 19.30 horo en hotelo "SLOVAN" Lidická str. 23. Ĉiam estas interesaj prelegoj. La 13an de dec. okazos solena artvespero memore al d-ro. L. L. Zamenhof. Nova kurso komencis la 20/10. en la Ekonomia lernejo, Pionýrská str 23.

**CHVALATICE-Vranov**, la Esp-someran tendaron ĉi tie partoprenis ĉir. 150 gek-doj. Dum 6 semajnoj, ĉiam antaŭtagmeze oni lernis Esp-on., ĝian historion, literaturon k movadon. Posttagmeze estis ekskursoj, prelegoj, amuzoj ktp.

**KOPŘIVNICE**, la uzina gaz. TATROVÁK de granda aŭto-kaj traktorfabrik-o "TATRA" publikis duonpaĝan kolonon kun let. degen. sekr. de "MEM" k-do. A. Balague kaj let. de k-do. Robert Faraill el Francio, kontraŭ la germana rearmado.

**MOST**, Esp-junul. rondeto ĉe OKH-klubo kunvenas regule ĉiu marde de 19-20a horo. 9 anoj partoprenis la Someran Esp-Kolegion en Doksy.

**OLOMOUC**, en nia regiono fondiĝis du novaj Esp-rondetoj. La unua funkcias sub protekto de la Industria Entrepreno en Jeseník k la dua ĉe la Nacia Entrepreno "LENAS" en Bruntál. Sub gvido de k-do. Vl. Pečinka procedas kurso kun 22 komencantoj. La Regiona Pionira Domo en Olomouc invitis ĉiujn lernejdirektorojn kaj gvi-dantojn de pionirgrupoj, ke ili propagandu Esp-on. Sekve jam aliĝis kelkdekoj por kurso, kiun gvidos k-do. Jan Polzar. Nia rondeto eldonis fotomultobligitan lernolibron de Kilián por siaj membroj. La 10a Jubilea Konferenco de Esp-rondetoj el la regionoj Ostrava kaj Olomouc okazos de 7-8. januaro en Olomouc.

**OSTRAVA**, la uzina klubo de ferfabrikoj "VŽKG" en Vítkovice aranĝas de 24-30. de okt. Esp-seminarion kun interesaj aktualaj prelegoj. 50% fervojrabato. Aliĝu ĉe k-do. L. Adámek Hornícká č. 304, PORUBA u Ostravy. La uzina gaz. "JISKRA" de "VŽKG" decidis aperigi regulan angulon por informoj de sia Esp-rondeto. En unu el tiuj raportoj ni legas, ke komence de 21. 10. funkcias en la uzina klubo regule ĉiu merkrede Esp-kursoj de 15-16a h. por komencantoj kaj de 16-17. por progresintoj. Instruas ŝtate ekzamenitaj instruistoj. De 17-20. kunvenas la junularo, kiu ankaŭ aranĝas kursojn. Instrua seminario kun ĉeĥaj kaj Esp-prelegoj procedos sub la devizo "Per Esperanto por la Mondpaco!"

**PRAHA**, la Klериka Societo/C.B./ en Praha-II. decidis subteni la laboron de esp-istoj. Post raportoj pri la lastatempa situacio, vigla agado en ĉiuj Popoldemokratioj, kaj precipe en Sovjet-Unio, kiujn al ĝi la klubo en Praha prezentis, petis la Kler. Societo de la Nacia Komitato en Praha, ke la klubo prezentu al ĝi siajn dezirojn, kiujn ĝi promesis plenumi. Jam estas al la klubo sekurigita nova klubejo, pri kio oni antaŭe tute ne montris intereson. Al kunveno de kult. laborantoj de la Centra Nacia Komitato kaj ĉiuj distriktaj Naciaj Komitatoj en Praha estas invitita k-do. Josef Vítek, la prezidanto de la Esp-ista Tutŝtata Konsulta Komitato/ETKK/ por doni siajn informojn. La Junular-rondeto dum la someraj vagancoj iomete stagnis. 8 anoj ĉeestis la Tutŝtatan Konferencon de Esp-istaj Pacdefendantoj en Otrokovice, kie samtempe okazis tutŝtata kunveno de Esp-junularo. K-do. Mařík Jar. el Praha estis elektita ĉefdelegito por la ĉeĥosl. Esp-junularo.

**TANVALD**, k-do. J. B. Kotek, Na Hlouhem lánu č. 30, Praha-6, kiu en aŭgusto vizitis ĉi urbon, akre kritikis pri la Esp-ekspozicia kesto, lokigita proksime de la stacidomo, ke ĝi estas unutona, senkolora/nur nigraj fotoj/, sen ia propagando kaj informo pri kunvenoj ktp. Tanvaldanoj bonvolu korekti vian keston!

**INSISTA PETO**

Nia bona kamarado, Jožka STANĚK, red. de NSÚ, Spojovací 16, PRAHA-IX, Ĉeĥoslovakio, urĝe bezonas "Parnasan Gvidlibron de Waringhien-Kalocsay, Plen. vortaron kaj Plenan Gramatikon..

La gek-doj, kiuj posedas tiujn verkojn, bonvolu vendu aŭ pruntu ilin.

KORESPONDI DEZIRAS :

3-linia anonco kostas 3.-Kčs aŭ 3 int.resp.kuponojn.Ĉiu anoncanto estas petata almenaŭ unufoje respondi per il.p.k.

K-dino.Helena HRUDKOVÁ,Krupinská cesta 1157,ZVOLEN,Ĉeĥoslovakio,kun la tuta mondo pri div.temoj.Interŝ. il.p.k.kaj p.m.

K-do.SOKOLOV Boris Ivanovič,translogis al nova adreso: Lenina No.34 ZDOLBUNOVO ROV.Sovjet-Unio.

K-do.S.V.SARIČEV,Ul.Osipenko d.56. kv.2,MOSKVO-127,Sovjet-Unio, tre deziras havi Bibliografian Katalogon de Georgo DAVIDOV el Saratov, kiu verŝajne antaŭ multaj jaroj estis eldonita en Germanio.

K-do.E.ROSNER,Lugauerstr.87,ÖLSNITZ -Erz.,Germanio-DDR.pri labormetodoj,foskvanto kaj vivo de ministoj, por disaŭdigi en uzina radio.

K-do.O.MAREK,instruisto,ŽAMBERK 797 Ĉeĥoslovakio,kun ĉiuj landoj interŝanĝi skarabojn kaj papiliojn.

K-do.Nikolaj Jordanov Ivanov, Vil. LISI-VRAH,regiono NOVI PAZAR,Bulgario,kun ĉiuj landoj per il.p.k, pri ĉiuj temoj.

K-dino.Mariana PANČEVA,str.Filip Totjn-28,SOFIA-10,Bulgario,kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

K-do.Velik Janev Gerov,NŠZO,Hr.Botev,TIRNOVO,Bulgario,pri ĉ.temoj.

MUNICIO POR NIA BATALO :

| | |
|---|---|
| K-do.J.Macner-Liberec........ | 6.-Kčs |
| K-do.J.Dittrich-Medlov........ | 13.-" |
| K-do.F.Pecka-Brno............ | 10.-" |
| K-do.J.Pátek-Holešov......... | 3.-" |
| K-do.K.Bělohradský-Cheb...... | 18.-" |
| K-dino.R.Dyčková-Bochoř...... | 2.-" |
| K-do.St.Chaloupka-Ostrava.... | 8.-" |
| K-do.J.Ballay-Brno........... | 10.-" |
| K- M.R. Praha................ | 10.-" |
| K-do.Fr.Pytloun-Poděbrady.... | 10.-" |
| K-do.Vl.Vladika-Litoměřice... | 3.-" |
| K-do.J.Bohanus-Ostrava....... | 3.-" |

Ĉiuj akceptu nian sinceran dankon!

HIROŜIMA kaj INFANOJ DE ATOMBOMBO

estas film-strio de diapositivoj, originalaj el Japanio,prezenteblaj en daŭro de 2 horoj per lumlanterno Esp-lingva teksto.Pruntas la red. kontraŭ libervola rekompenco.

MENDU ĈE NIA REDAKCIO :

"BULTENO"de bulgaraj esperantistoj bele multobligita,plejparte 10 paĝa,kun vere interesaj raportoj.Mendebla por 1955-56 kontraŭ pago de 13.-Kčs ĉe nia redakcio.

"MONDO KAJ KORO"-36paĝa presita broŝuro.Poemoj de K.Kalocsaj,por 3.-

"DU KOKCINELOJ",36paĝa broŝuro de Geza Gárdonyi,trad.de K.Kalocsay,havebla por 3.-Kčs.

"KANTOJ POR PACO"-20paĝa broŝuro kun orig.poemoj de Canko Murgin-Bulgario Eldonita en sept.1955.Grava propaganda dokumento por Popoldemokratioj. Aĉetebla por 3.-Kčs en nelimigita kvanto ĉe nia redakcio.

REZOLUCIO el Tutŝtata konferenco de ĉeĥosl.Esp-pacdefendantoj.En ĉeĥa k. Esp-lingvo,bele presita trafa propagandilo por Popoldem.por 0.50 Kčs.

"PACO",ofic.organo de "MEM",aperas ĉiu monate en alia lando,bele presita aŭ multobligita,kun riĉa enhavo literatura kaj gravaj informoj el la tuta mondo,parte kun ilustrajoj. Kelkajn novajn abonantojn el ČSR akceptas nia peranto k-do.Frant.Lička Březí č.12,OSTRAVA-Zábřeh.Jarabono: 16.-Kčs.Alilandaj gek-doj mendu ĉe sia landa peranto.

LASTMOMENTA GRAVA NOVAĴO

Ĵus antaŭ la redakcia fino sciigas al ni k-do.profesoro Mieczyslaw Sygnarski el Krakovo/Polio/,ke post liaj instigoj la ŜTATA JAGIELLONA UNIVERSITATO en Krakovo malfermis la 14. de okt.Esperanto-lektoraton. La unuan lecionon partoprenis 52 gestudentoj el diversaj fakultatoj.

Profesoro Signarski,kiu instruas, skribas,ke post kelkaj monatoj,eble en januaro aŭ februaro,li rekomendos al siaj aŭskultantoj aboni "PACO-n" kaj "LA PACDEFENDANTON".

Jen,jam la dua universitato en la Popoldemokratioj,kiu oficiale instruas Esperanton por servigi ĝin al la monda paco! Sinceran gratulon al k-do prof.Signarski kaj multan sukceson ni deziras al la krakoviaj gestudentoj!

KIE OKAZOS NIA II.TUTŜTATA ?

La redakcio atendas viajn proponojn!

ANKORAŬ NENIU ALIĜIS POR TRANSPRENI LA DISTRIBUADON DE "LA PACDEFENDANTO"

Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO-TATRA,n.p. KOPŘIVNICE,Ĉeĥoslovakio.
Redaktis: K-do.Rudolf BURDA,Palackého nám.č.6, P L Z E Ň ,=korespondadreso.